
# La NASKa Fasko

**Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace**

mardon, la 4-an de Julio, 2017 • numero unu

## Hodiaŭ • Today



★ **5:45 ptm:** Vespermanĝo / *Dinner*
Kunvenu en la unua etaĝo de nia loĝejo; Brajeno gvidos nin al la manĝejo. / *Meet in the common area of the first floor of the residence hall. Brian will lead the way to the cafeteria.*

★ **7:00 ptm:** Interkonatiĝa vespero / *“Meet-and-greet” evening*
Dua etaĝo de la ĉefa konstruaĵo / *Second floor of the Main Building*

## Morgaŭ • Tomorrow

★ **7:30 – 8:15 atm**
Matenmanĝo / *Breakfast*
Belk Dining Hall (#13 sur la mapo)

★ **8:30 – 12:15 ptm**
Grupa orientiĝo kaj kursoj / *Group orientation and courses*
Flowe Building, ĉambro #110

★ **7:00 ptm:** Enkonduko al la Kino-Teatro-Festivalo (KTF) / *Introduction to KTF*

## Verku por la *Fasko!*

**(aŭ eble fotu, desegnu, anoncu…)**

*La NASKa Fasko* estas forumo por ekzerci vin en verkado kaj dividi viajn verkojn kun aliaj lernantoj. Sendu poemojn, ŝercojn, leterojn, bildstriojn, artikolojn pri viaj ŝatokupoj…ktp.

Vi povas porti kontribuaĵojn al la redaktejo ĉambro 112, aŭ (eĉ pli bone) sendu ilin al:

**naska.fasko@gmail.com**

**Dankon!**

# Bonvenon al NASK!

*Brian HARMON (“Brajeno”) estas la help-instruisto de NASK. Li redaktas la ĵurnalon kaj organizas la eksterkursajn programojn. Serĉu lin en ĉambro 112 (kie li eble demandos, ĉu vi volas verki ion por la* Fasko*).*

Saluton, kaj bonvenon al NASK! Mi tre ĝojas, ke vi decidis veni kaj studi Esperanton kun ni. Hodiaŭ estas tago por simple alveni, alkutimiĝi al la loko, kaj ekkoni la aliajn NASK-anojn.

Morgaŭ post matenmanĝo ni ĉiuj kunsidos por orientiĝo pri la programo kaj por prezenti al vi la instruistojn. Ni faros grupan foton kaj poste la lecionoj komenciĝos.

Ĉi-vespere je la 7-a horo okazos “interkonatiĝa vespero” en la dua etaĝo de la konstruaĵo *Main* (#1 sur la mapo). Tio estos okazo por neformale babili kun la aliaj lernantoj kaj la instruistoj.



“Meta-foto”: Brajeno prilaboras tiun ĉi numeron de la *Fasko*

*Saluton*, and welcome to NASK! I’m very happy that you decided to come and study Esperanto with us. Today is a day to simply arrive, settle in, and start to get to know the other members of the NASK community.

Tomorrow after breakfast we’ll all meet for an orientation and introduce the instructors. We’ll take a group photo, and then the lessons will begin.

Tonight at 7 o’clock there will be a gathering on the second floor of the Main Building (#1 on the map). This will be a chance to chat informally with the other students and the instructors.

Jen kelkaj aliaj gravaj informoj:

- La horoj de la manĝejo (*Belk Dining Hall*) estas:
  **7:30 – 8:15 atm:** matenmanĝo
  **12:15 – 1:15 ptm:** tagmanĝo
  **5:45 – 6:30 ptm:** vespermanĝo
- En la tria etaĝo de nia loĝejo, fine de la koridoro, estas kuirejo kun mikroonda forno, fridujo, ktp.
- En la unua kaj dua etaĝoj estas vestolavejo, kie vi povas senpage lavi vestaĵojn. Ni lasos por vi botelon de lesivo en unu el la vestolavejoj.
- Rimarku, ke la pordo de via ĉambro ne aŭtomate ŝlosiĝas kiam vi foriras, eĉ se vi jam premis la butonon sur la tenilo por ŝlosi ĝin de interne. Por ŝlosi ĝin de ekstere, nepre uzu vian ŝlosilon.


Finfine: se vi bezonas ajnan helpon dum NASK, bonvolu kontakti al mi, al Liĉjo MILLER en ĉambro 110, aŭ al Ellen EDDY en ĉambro 107.

Some other important information:

- The hours for the cafeteria (Belk Dining Hall) are:
  **7:30 – 8:15 am:** breakfast
  **12:15 – 1:15 pm:** lunch
  **5:45 – 6:30 pm:** dinner
- On the third floor, at the end of the hallway, there is a kitchen with a microwave, a refrigerator, etc.
- On the first and second floors there is a laundry room where you can wash your clothes for free. We’ll leave a bottle of detergent in one of the laundry rooms for you.
- Note that the door to your room does not autmatically lock when you leave, even if you pushed the button on the handle from inside. To lock it, be sure to use your key.

Finally: if you need any help during NASK, please contact me (Brian) in room 112, Lee Miller in room 110, or Ellen Eddy in room 107.

# Mapo de la universitato




## Notoj

- La loĝejo por ĉiuj lernantoj kaj instruistoj estas *Finley Hall*, numero 2 sur la mapo.
- Lecionoj estas en *Flowe* (n-ro 9).
- Ĉiuj manĝoj okazos en la konstruaĵo *Belk Dining Hall* (n-ro 13). La manĝejo estas en la kelo (subtera etaĝo). Sekvu la ŝtuparon malsupren.

## Konstruaĵoj

- 2 — **Finley Hall** (nia loĝejo)
- 9 — **Flowe Building** (klasĉambroj)
- 13 — **Belk Dining Hall** (manĝejo)
- 1 — **Main Building** (teatro)